


# BULTENO

DE ESPERANTISTA KLUBO ĈE  
OSVĚTOVÁ BESEDA EN PRAHA 2.




Nro 2.

Aprilo 1953

Aperas laŭbezono

## NI REMEMORAS



15. XII. 1859 ~ 14. IV. 1917

Ne mortos jam nia bravega anaro,  
Ĝin jam ne timigas la vento, nek staro.  
Obstine ĝi paŝas, provita, hardita,  
Al cel' unu fojon signita.

1903

PROGRAMOJ DE KLUBAJ VESPEROJ EN APRILO

8.4. Varietea Jozefa Vespero, kiu pro konataj kaŭzoj ne povis esti en

marto. Venu ĉiuj membroj! Per bonhumoro kaj bona amuzo regalos vin niaj klubaj artistoj sub gvido de Antonín Slanina.  
15.4. PhDr Augustin P i t l í k : L.L.Zamenhof - lia vivo kaj verko.  
22.4. Josef V í t e k : Novaĵoj en Esperantujo.  
29.4. Dolfa B a r t o ŝ í k : Mia poresperanta laboro en Nederlando.

-.-.-

NIAJ MALNOVAJ EKSTERLANDAJ AMIKOJ NE FORGESAS NIN!

Kioŝi IKEGAVA el Osaka vivis mallonge en Praha en la jaro 1936. Dum la pasinta jaro li vizitis Eŭropon, estis relative tre proksime al ni, sed ne povis nin viziti. Ĵus ni ricevis de li poŝtkarton, per kiu li salutas ĉiujn, kiuj lin konas. S-o Ikegava optimisme certigas nin, ke dum sia venonta vojaĝo al Eŭropo li certe vizitos nin!

Sveda s-o E. BONANDER el Karlskoga sendis al ni du sendaĵojn da gazetoj, kiujn ni vere ne povus en nuna tempo abonpigi. La gazetoj kune kun la aliaj, kiujn ni ricevas, estas je dispono de nia anaro dum ĉiu kluba vespero. Ni kore dankas al s-o Bonander, kiu havas en Praha plurajn personajn amikojn!

-.-.-

#### G R A V A A T E N T I G O

#### ENKETO PRI LERNADO DE E S P E R A N T O

Por grava celo Centro de Esploro kaj Dokumentado de UEA devas esplori laŭ kiu maniero la esperantistoj ĝenerale ellernas Esperanton. Tial ĉiuj niaj membroj aŭ legantoj de nia bulteno estas petataj respondi (adreso: s-o Jar. Ŝustr, Praha I., Dlouhá 10) jenajn demandojn:

1. Nomo de la ŝtato, en kiu vi naskiĝis.
2. Kiom da jaroj vi havis kiam vi ellernis Esperanton por interkompreniĝi sen malfacilaĵoj.
3. Kiun lernejon vi absolvis antaŭ aŭ studis dum la ellernado de Esperanto (elementan, mezgradan, fakan, universitatan aŭ simile).
4. Ĉu vi ellernis Esperanton
  - a) kiel gepatran aŭ familian lingvon,
  - b) en kurso organizita de iu Esperanta societo, grupo, klubo, asocio aŭ alia organizaĵo,
  - c) en iu el normalaj lernejoj,
  - d) kiel memlernanto el lernolibro.

Ĉar temas pri vere grava enketo, ni sincere petas niajn legantojn, ke ili afable respondu ĉi-suprajn demandojn poŝtreturne! Pri la rezultoj de la enketo ni informos vin en unu el la sekvantaj numeroj de nia bulteno.

-.-.-

Serĉataj estas:

ESPERANTO INTERNACIA, numeroj 7,8 kaj 11 de jarkolekto 1951  
ESPERANTO (UEA) jarkolektoj kaj unuopaj numeroj el la jaro 1921 kaj ĉiuj antaŭaj.  
Kiu povas ilin donaci aŭ vendi, sendu aŭ proponu ilin al s-o J. Ŝustr, Praha I., Dlouhá 10.

-.-.-

Eldonkvanto: 500 Venonta numero aperos komence de majo.

- - -